

Junio 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolion.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Conseil d'Administration (tous les membres sont les bienvenus) : 25 juin 2024

Siège : sur RDV chaque mercredi de 17h30 à 20h

Cours pour débutants à Villeurbanne et en ligne chaque lundi soir

Paroligaj kursoj : mardis 18 et 25 juin en ligne

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi

Grésillon : Cours marathon du vendredi 5 juillet vers 18h au lundi 15 juillet 2024 matin

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Anita BASTRENTA, Pascale VOLDIORE, Marc-Olivier GRAZIANI, Joseph CATIL, Andréa BERTRAND.

ANTAŬPAROLO

Mi ĝojas prezenti al vi modestan evoluon de nia Bulteno. Ni nomis ĝin "Ĝis Cent". La elektita nomo "Ĝis Cent" estas omaĝo al S-ro Richard LEVIN, kiu kreis la lionan gazeton "Ĝis mil" en 1934 kun la celo kolekti mil membrojn. Ni elektis iom pli modestan celon por nia epoko. Ĝi restas ambicia kaj atingebla, kiel tiuepoke.

Sed la nomo ne nur spegulas nian celon atingi cent membrojn, sed ĝi ankaŭ simbolas nian deziron ricevi cent partoprenojn en la bulteno mem po unu jaro. Tio estas invito al ĉiu el vi por kontribui kaj partopreni!

Sen tro ŝanĝi ĝian enpaĝigon, ni volas igi ĉi tiun dokumenton modifebla de ĉiuj. Ĝi do restas simpla en sia formo.

Mi deziras danki Joseph CATIL-n, kaj Thierry TAILHADES-n, kiuj laboras por nia bulteno edke pluraj jaroj. Estas danke al ili ke ni povis daŭre legi ĉi tiun gazeton. Bulteno estas fundamenta por raportoj pri niaj agadoj, kaj ankaŭ konservi registron de niaj agoj.

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI



☛ **Letero de leganto:** “De Sibayama Zyun’iti, redaktanto de Novaĵoj Tamtamas de Esperanto Jokohamo, Japanio.

Dankon pro la alsendo de la maja numero. Tie estas artikolo de la vojaĝanto al Japanio, kaj pri Hajkisto Matsuo Basho. Nu, lastatempe, lia ĉefverko “Streta vojo al fora interno” (japane: “oku-no-hosomichi”) aperis kiel elektronika libro de Kindle, en paralela traduko esperanto-japana. Vi povas scii detalon per: <https://amzn.eu/d/2dVikBV>”



☛ **Paroligaj Kursoj por nia regiono : Novaj Paroligaj Kursoj en Junio!**

Pro la granda entuziasmo montrita en la respondoj al nia enketo pri la Paroligaj Kursoj, Andréa decidis proponi du sesiojn komencantajn marde la 18-an kaj la 25-an de junio!

Kontaku nin por aliĝi al tiuj kursoj kaj ricevi la unuan tekston!

☛ **Kunveno “Dialogues en Humanité”:** (Dialogoj en Humaneco): Ni anoncas nian revenon al “Dialogues en Humanité” ĉi-jare! Post pluraj jaroj de foresto, nia asocio denove partoprenos ĉi tiun eventon en la Parc de la Tête d'Or en Liono, de la 5-a ĝis la 7-a de julio 2024. Ni bezonas volontulojn por prizorgi budon kaj paroli kun la publiko. Se vi interesiĝas, bonvolu respondi al ĉi tiu enketo: <https://framadate.org/uavEmhQxR6orxHCB>. Ni atendas vian partoprenon!

☛ **Lionanoj en Strasburgo** - Andréa BERTRAND : Kvin el niaj membroj partoprenis la eŭropan kongreson en Strasburgo, urbo kie troviĝas la Parlamento, kiun niaj amikoj povis viziti! Sed momento precipe markis min: “Je la fino de la evento, Bruno FLOCHON montris bildojn de la unua komuna kongreso kun Germanio en 1969. La kongresejo tiam estis la sama kiel ĉi-jare. En la amfiteatro troviĝis kelkaj homoj, kiuj partoprenis tiaman kongreson. Du el ili estis gefratoj, kiuj tiam aĝis 5 kaj 10 jarojn. La plej aĝa estis la frato, kaj li rakontis siajn rememorojn. Li estas germano kaj komparis la 55 jarojn antaŭ kaj post la unua komuna kongreso. Estis emocia momento.”

Gijom Armide, talenta membro de nia asocio, faris belan koncerton! Jen foto, kiun Neil faris:



☛ **Iri al Skandinavio por vidi la Nordajn aŭrojn? Ne, tutte ne!** - Anita BASTRENTA - Foto : Marc-Olivier en Les Monts du Lyonnais (la lionaj montetoj) -

Dum la noktoj de la 10-a kaj la 11-a de majo 2024, la nordlumaj aŭroroj ekbruligis la francian ĉielon. Maloftega fenomeno, ili estas la konsekvenco de granda suna ŝtormo. Ĝi estis la plej impona el la pasintaj 20 jaroj. Suna ŝtormo manifestiĝas per tre potencaj sunaj ekflamoj. Tiuj ekflamoj ellasas tre rapidajn kaj varmegajn gasojn, ŝarĝitajn per elektro.

Atentu: eblas ke la fenomeno reaperos ĝis 2025! Vi povas elŝuti la apon “Aurora” por ricevi mesaĝojn pri tiu.



☛ **Memoriga Solenaĵo pri la 8-a de majo** - Marc-Olivier GRAZIANI: Mi ĉeestis la memoriga solenaĵo de la 8-a de majo en Villeurbanne. Tiu dato, estas la datreveno de la kapitulaco de la nazia Germanio en 1945, ĝi ankaŭ memorigas malhelan periodon por la esperantistoj. Fakte, la esperanta lingvo, kiu antaŭenigas la idealojn de paco kaj internacia unueco, estis kondamnita de totalismaj reĝimoj, inkluzive la naziojn. Hitler mem menciis esperanton kiel minacon en sia libro "Mein Kampf", ĉar li konsideras ĝin kiel eblan ilon de juda superregado.



☛ **Rakonto pri naturo** - Joseph CATIL

Merle noir – « Merlo » vivas en parkoj, ĝardenoj, arbaroj, heĝaj kamparoj. Ĝi travivinas en la okcidenta parto de Eŭropo, akj do vintre en nia regiono ili restas en la ĝardenoj. Ofte ĝi kantas supre de la tegmetoj kaj televidantenjoj, pinte de la arboj. Ĝia nutrado estas lombrikoj, insektoj kaj beroj.

Nigre aspekta kun flava beko kaj longa vosto, oni ne konfuzu ĝin kun "Makula sturno" (étourneaux). Sur la grundo ĝi saltetas moviĝante por kapti lombrikojn aŭ por sin kaŝi sub arboj. La kriado estas laŭ la cirkonstancoj: time « tsiih » aŭ alarme « serio da pli-pli-pli-pli » kiam ĝi forflugas pro alveno de kato...



☛ **Europe-Democratie-Esperanto (EDE):** EDE prezentos kandidatliston nomatan "Esperanto kiel Komuna Lingvo" por la Eŭropa balotado la 9-an de junio, gvidatan de Laure Patas d'Illiers. Andrea havas afiŝojn por EDE. Se vi interesiĝas helpi disvastigi informojn pri la kandidatlisto kaj subteni Esperanton kiel komunan lingvon en Eŭropo, vi povas kontakti ŝin por preni afiŝojn.

Tamen, ĉar EDE estas politika partio, ĉi tiu agado estas tute individua iniciato kaj ne estas oficiale subtenata de nia klubo. Ni restas nepolitikaj kaj celas nur al la disvastigo de Esperanto kiel neŭtrala lingvo.

Ĉi tiuj afiŝoj estas parto de la kampanjo por pli granda rekono de Esperanto kiel neŭtrala kaj facile lernebla lingvo, kiu povus plifaciligi komunikadon inter diversaj landoj kaj kulturoj en Eŭropo. Tamen, ni atentigas vin ke pliajn punktojn el la programo ne rekte rilatas al Esperanto.

Se vi volas individue partopreni en la disvastigo de ĉi tiu partio, bonvolu kontakti Andrea-n por ricevi la afiŝojn.



☛ **La danĝeroj de urba trafiko en la epoko de Zamenhof** - Pascale VOLDOIRE

Ni trovis 3 ekzemplerojn de Marta en la ŝranko de la rue Major Martin, unu en strato Du Bélair, kaj unu ĉe mia patrino... Mi ne komprenis kial tiu romano de nekonata Pola aŭtorino troviĝis... tiom multe. Zamenhof tradukis ĝin de la pola. Kutime, li tradukas la Biblion, Ŝekspiron ktp... Do mi decidis legi ĝin. Teda tasko de 237 paĝoj, sen ĉapitroj...

Juna Polo de la burĝa socio igis vidvinon. En unu semajno, ŝi perdis sian edzon, sian statuson, sian domon, sian monon. Trovi laboron urĝis ĉar ŝi devis pagi la luprezon de sia domaĉo, aĉeti lignon por la forno kaj nutraĵon por si kaj sia knabineton.

Kiam ŝi vivis kun sia familio, ŝi lernis iom da franca lingvo, da desegno. Ankaŭ, ŝi lernis ludi pianon, kiel bone edukita junulino, por edziniĝi kun junulo de la sama rango, « bona partio ».

Do, ŝi intencis esti profesoro en burĝa familio, laŭ siaj eblecoj. Sed, ŝia unua lernantino parolis france pli bone ol ŝi. Ŝia dua lernantino ludis pianon pli bone ol ŝi. Ŝiaj desegnoj ne konvenis, ĉar tro amatoraj... Iom post iom, malespero venkis ŝin.

Finfine, ŝi jetas sin sub « la rado de la grandega veturilo, kiu frakasis la bruston de Marta kaj elpelis de ŝi la vivon. » Larmoj, melodramo... Ne nur...

Tiu romano priskribas la vivon de burĝaj virinoj, kiuj malgraŭ kuraĝon, energion, rektanimecon ne povis vivteni sen edzo aŭ familio. Ili estis edukitaj kiel floroj aŭ papilioj sen imagi la realaĵojn de la vivo.

Mirinde, tiu romano plivigligis la virinan movadon. Ĝi kortuŝis Zamenhof-n kiu tradukis ĝin. Ankaŭ, li omaĝis al siaj patrino, edzino kaj filinoj. Post la traduko, la libro estis vendita en Japanio kaj Ĉinio, kaj helpis la virinojn trovi argumentojn por pli da justeco.

Por la unua fojo, Esperanto estis pontolingvo inter Eŭropo kaj Azio, per literaturo.

Julio - Aŭgusto 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolion.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis

Derniers cours pour débutants à Villeurbanne le 8 juillet.

Kulturaj Renkontiĝoj : retour en novembre 2024 suite au succès du mois de juin !

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi

Grésillon : Cours marathon du vendredi 5 juillet vers 18h au lundi 15 juillet 2024 matin

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Pascale VOLDIORE, André DELORME, Neil ROBERTS, Marc-Olivier GRAZIANI, Joseph CATIL, Charles LASSAUX.

ANTAŬPAROLO

Kun profunda malĝojo, ni anoncas la forpason de unu el niaj plej fidelaj kaj plej estimataj membroj, Alain PIALLA. Alain devenis de esperantista familio en Drôme.

Kiel fervora esperantisto, li, kun sia edzino Paulette, organizis renkontiĝojn en la MJC de Rillieux la Pape. Mi mem renkontis nian amikon Alain dum la kulturaj kunvenoj, kiuj okazis en nia sidejo.

Niaj pensoj iras al Paulette, al kiu ni sendas nian plej sinceran subtenon en ĉi tiu malfacila tempo. Andréa BERTRAND veturis ĝis la tombejo de Montjoux por akompani ŝin en ĉi tiu malfacila momento.

Alain restos en niaj koroj kaj memoroj. Lia dediĉo al Esperanto estos ĉiam memorata.

Sincere,
Marc-Olivier GRAZIANI



☛ **Letero:** Aux amis espérantistes de Lyon, "Lidia Zamenhof, fille de l'espéranto" de Wendy Heller, notre traduction dite de courtoisie est terminée. Je suis heureuse de l'offrir à ceux qui ont tant compté dans sa vie, les espérantistes de Lyon. Vous pouvez la diffuser la partager librement. Elle a sans doute des imperfections que tout travail solitaire génère, soyez indulgents! Cela aurait mérité un vrai livre, un métier d'éditeur que j'ai pratiqué dans ma jeunesse. Avec mes remerciements pour l'aide que vous nous avez apportée. Josie MARIE-STENNEVIN

J'ai aussi fait la généalogie de la famille Borel, ces nobles cœurs.

Contact : josie.nanoune.marie@gmail.com

☛ La lionanaj geamikoj renduevis al la kongresejo - Pascale VOLDOIRE

Kia spektaklo ! Ĝi okazis en agrabla, verda universitatejo. La konstruaĵo kiu akceptis nin, dediĉita al « Homaj Sciencoj », omaĝo al nia lingvo, povis ricevi la 600 kongresanojn, inter ili multaj junuloj. Prelegoj kaj malkovro de belega Strasburgo pasigis la tempon en agrabla etoso. Sed tio, kio kortuŝis min, estis la renkontiĝo kun maljuna Germanino, kiun mi renkontis tute hazarde en nia hotelo. Ni komencis paroli kaj ŝi diris ke ŝi loĝas en Schwerin, urbeto proksima de Hamburgo. Tute hazarde, mi vizitis tiun urbeton antaŭ kelkaj jaroj... Tiu hazardo kreis fidon : ŝi komencis rakonti sian vivon. Bonŝance, ĝi estis romano ! Ŝi naskiĝis en 1943, en Kenisbergo (germana urbo en tiu epoko) en familio de 7 infanoj... Kiam la Rusoj invadis Germanion, Kenisbergo iĝis Kaliningrado. La familio fuĝis... Polandon. Tie, la patro estis kaptita de la Rusoj kaj unu frato mortis pro morbito. La patrino kaj infanoj translokiĝis ĝis Schwerin en DDR (siamtempe orienta Germanio). Ili retrovis la spuron de sia patro fine de la milnaŭcentjardekoj. La Rusoj sendis lin al gulago kie li restis pli ol 30 jarojn, sen novaĵoj de sia familio, kaj mortis. La dua ĉapitro mi ne konas... Kiel la familio vivtenis ktp... La peto estas nefarenda: tikla periodo... Ni havas multajn filmojn, romanojn aŭ seriozajn studaĵojn por havi opinion.

Por mi, tiuj neoficialaj, spontanaj renkontiĝoj inter fremduloj povas okazi nur inter esperantistoj. Tio estas la trezoro de Esperanto: krei historiojn kaj ligojn inter Homoj...

☛ **Jen la nova estraro de Esperanto-France:**

Xavier Godivier: Prezidanto

Régis Fabre: Kasisto

Jean-Lucien Mazeau: Vic-Kasisto

Paul Quevy-Lefevre: Vic-Kasisto

Claire Divoy: Sekretario

Raymonde Coquisart: Estrarano

Marcelle Provost: Estrarano

Gilles Tabard: Estrarano

☛ **Lucien PERAIRE** : Laŭ invito de la urbestro de Lavardac (Lot-et-Garonne), okazas inaŭgura ceremonio de la statuo de Lucien Péraire, esperantisto naskiĝinta en tiu urbo, kiu bicikle vojaĝis de Francio ĝis Ĉinio en la jaroj 1928-1932. Lucien Péraire estis SATano. Estas en la revuo "Sennaciulo" ke li eksciis, ke germana kamarado serĉas vojaĝan kunulon por vojaĝo al la Malproksima Oriento.



☛ **Staĝo:** Esperanto- kaj marŝo-staĝo en la franca Ĵuraso, proksima de la svisa landlimo. 3 aŭ 4 niveloj de kursoj kaj pluraj malstreĉigaj agadoj: promenoj, malkovro de la regiono, koncertoj, prelegoj, ludoj... En la centro Les Sapins de l'Amitié, loĝado laŭ la partoprena spirito de popola edukado. Kontakto: stagemetabief@orange.fr
Datoj : 18-24/08/2024

☛ **IJK** - Joseph CATIL : La 80-a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) okazos en Šventoji, Litovio, dum 18-25-a de aŭgusto. Ĝi estos la unua IJK en Baltia Regiono ! - Litovio estas lando kun miljara historio, situanta en geografia centro de Eŭropo (ĝia nomo unuafoje en skribaj fontoj estis menciita en la jaro 1009).

Aliĝilo: <https://ijk2024.tejo.org/alighilo>

Pli da informoj pri IJK: <https://ijk2024.tejo.org>


☛ **Kulturaj Renkontiĝoj** : Ni volas esprimi nian sinceran dankon al Andréa, kiu organizis du Kulturajn Renkontiĝojn per Zoom. Ŝi estigis varman etoson, en kiu ĉiuj povis partopreni kaj praktiki nian lingvon. Dankon Andréa pro via dediĉo kaj entuziasmo. Ni antaŭĝojas partopreni en la venontaj renkontiĝoj!

☛ **“Akvo” sur la Misio Europa Clipper** - Marc-Olivier GRAZIANI : NASA lanĉos la mision "Europa Clipper" en oktobro 2024 por esplori la lunon de Jupitero, Europa, kiu estas konata pro ĝia subglacia oceano. Kun la sciencaj iloj, la kosmoŝipo portos specialan mesaĝon: la vorton "akvo" gravuritan en 103 malsamaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Ĉi tiu mesaĝo estos parto de la projekto "Message in a Bottle" (Mesaĝo en Botelo), kiu celas simboli la universalan gravecon de akvo por la vivo. La gravuraĵoj de la vorto "akvo" estas prezentitaj kiel ondformoj.



Aldone al la gravuraĵoj de "akvo", la komemoriga plato ankaŭ enhavos poemon verkitan de la usona poeto Ada Limón kaj portreton de la sciencisto Ron Greeley.


Per ĉi tiu misio, NASA celas ne nur sciencajn esplorojn sed ankaŭ antaŭenigi internacian kunlaboron kaj komprenon. NASA sukcesis kapti la atenton de homoj tra la mondo, kun pli ol 2.6 milionoj da nomoj skribitaj kaj senditaj por esti parto de ĉi tiu historia vojaĝo.



☛ **Triki por Esperanto** - Neil ROBERTS : Homoj ŝatas montri siajn ŝatokupojn per siaj vestaĵoj, ĉu per t-ĉemizo de sia preferata futbalteamo ĉu kun bildo de ŝatata televidserio. Sed kio pri Esperanto? Bedaŭrinde Esperanto ne estas tiel populara ke oni povas facile trovi esperantajn vestaĵojn en la grandaj vendejoj. Sed tio ne estas problemo, ĉar ni povas krei niajn proprajn vestaĵojn! Unu maniero por fari tion estas trikado. Lerninte kelkajn bazajn teknikojn, oni malfermas pordon al libera esprimado de sia imago per teksaĵoj. Oni povas adapti tradician vestaĵon per la koloroj de Esperanto kiel la ŝtrumpetoj en la foto, aŭ oni eĉ povas sekvi recepton verkitan en Esperanto kiel la Ĉapelon de Esperantujo. Kiu scias? eble porti tiajn vestaĵojn okazigos hazardan renkontiĝon kun nekonata esperantisto kiu rimarkos vin per viaj belaj verdaj kaj blankaj koloroj. Se tio interesas vin, eble ni vidos unu la alian en estonta esperanta trikoklubo en Liono.



☛ **Rakonto pri naturo** - Joseph CATIL : *Etourneau sansonnet* – « Makula sturno vivas en bandoj videblaj en kamparo kultivita, parko, ĝardenoj, arbaroj kaj proksime de urboj. Oni ne konfuzu la Makulan sturnon kun la Merlo, ili tre similas sed la plumaro de la Makula sturno brile aspektas verd-viola kun flav-blankaj makuloj, la vosto mallonga kaj la pinta beko flava. La rapida flugado ondulas tre atenteme en bandego ĉielen. La krio « tchuyrrr » zumanta je la elflugo aŭ alarme ĉe la nesto « stèèh » ĝi povas fajfi kiam suno brilas vintre. Ĝi ankaŭ povas imiti kriojn de aliaj birdoj.



☛ Alia transnacia kulturo : Tamazight -

André DELORME : La berbera lingvo, aŭ tamaziĥto, havas sian propran skribsistemon, Tifinagh - tuaregan alfabeton, □□□□□□□□

Estas dudek sep berberaj lingvoj. La tuto nomiĝas tamaziĥto. Inter ili la ĉefaj estas la kabila, kaj Ŝaui en Alĝerio, Ŝleŭ en Maroko, Tuareg en Malio kaj Niĝero, Zenega en Maŭritanio, Siwi en Egiptujo.

Oni taksas, ke estas inter dudek kvin kaj tridek milionoj da parolantoj, inter ili unu verŝajna miliono en Francio.

La berbera kulturo estas konata pro sia tradicia kuirarto, siaj tribaj sportludoj (Fantasia), siaj metioj kiuj kombinas antikvan tradicion kaj modernecon, ĝiaj lulkantoj, rakontoj kaj tamaziĥt-vartejrimaroj. Literaturaj verkaĵoj en la berbera restas limigitaj kaj ofte estas reverkitaj en "aliaj". lingvoj.

Ekde 2001, la berbera estas oficiale agnoskita kaj instruita en Maroko, kiu kreis la Reĝan Instituton de Amazigh Kulturo. Ankaŭ en Alĝerio la lingvo iĝis nacia lingvo en 2002 kaj oficiala lingvo en 2016 kun Alĝeria akademia de tamaziĥto. Ĝia kulturo rezistis tempon, invadantojn kaj diversajn komercajn influojn. Ĝi estas valorigita en kino per la filmo Azar pri la temo de la destino de virinoj en la kabila komunumo. Berbera muziko estas produktita kaj distribuita kun vera populara sukceso fare de la grupo de tri kabilaj fratinoj DjurDjura kaj la fama kantisto Idir.

Tiu tuta berbera kultura itinero estis elmontrita dum la Berbera Printempo 2024 en Parizo. Tamaziĥto estas instruata en Parizo ĉe Inalco. <https://www.inalco.fr/>



☛ **Disavastigo** : Adamo, aktiva membro de nia asocio, daŭre deponas flugfoliojn en lionaj bibliotekoj! Dankon al li!



☛ Kial Lerni Esperanton en la Epoko de Artefarita Inteligenteco? - Marc-Olivier GRAZIANI

Dum mi pripensis la demandon "Kial lerni Esperanton en la epoko de Artefarita Inteligenteco?", mi trovis ok konvinkajn kialojn. Tamen, mi devas konfesi, ke mi ne ŝatas la esprimon "Artefarita Inteligenteco", ĉar tiuj sistemoj nur imitas inteligentecon. Malgraŭ tio, jen miaj kialoj por lerni nian internacian lingvon...



Energio - Por krei enhavon per artefarita inteligenteco, estas bezonata gigenta kvanto da energio... sen forgesi la baterion por funkciigi la uzatan aparaton!

Riĉeco - Traduksistemoj ne estas aĉeteblaj de ĉiuj homoj tutmonde. Ili estas rezervitaj por la plej riĉaj, kaj ofte nur en la plej teknologiaj landoj.

Libereco - Dependi de teknologio estas dependi de sistemo. Ekzistas cenzuro, vole aŭ nevole, kiu povas malrapidigi aŭ modifii la disvastigon de informoj, sen ke vi tion sciu.

Cerbo - Lerni lingvon estas bonega maniero por plibonigi la cerbajn kapablojn. La avantaĝoj estas multaj: memoro, koncentriĝo, kompreno, ktp.

Interago - Paroli rekte kun alia homo, sen elektronika perado, estas vera plezuro. Esperanto estas ankaŭ tutmonda komunumo, kiun vi povas rekte alparoli.

Kaj, la tradiciaj respondoj ankaŭ valoras:

Neŭtraleco - Esperanto estas neŭtrala lingvo, kiu ne favoras iun ajn nacian kulturon ĉar ĝi ne estas la lingvo de iu ajn popolo aŭ lando. Ĝi helpas protekti la naciajn lingvojn kaj dialektojn.

Facileco - Ĉiuj ne estas egalaj en la lernado de lingvoj. Lerni Esperanton ebligas ĉiujn lerni lingvon. Ĝi ne estas rezervita al intelekta kaj eminenta homararo. Lerni Esperanton estas ankaŭ bonega maniero por komenci la lernadon de aliaj lingvoj, aŭ plibonigi nian nacian lingvon.

Valoro - Esperanto estas lingvo, kiu enhavas la ideon de interkultura kompreno. Ĝi estas signo de aŭskultado kaj paco.

Septembro 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis

Reprise des cours en ligne pour débutants le 23/09 à 18h30.

Kulturaj Renkontiĝoj : retour en octobre 2024 suite au succès du mois de juin !

Forums des associations : 7 et 14 septembre, avis aux volontaires !

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Neil ROBERTS,
Marc-Olivier GRAZIANI,
Joseph CATIL, Andrea
BERTRAND, Anita
BASTRENTA

ANTAŬPAROLO

Nia asocio decidis translokigi siajn arkivojn al la Biblioteko Diderot, administrata de ENS* Lyon. Tiu ĉi iniciato eblis danke al ago de CNRS* kadre de projekto por administrado de la esperantaj arkivoj en Francio. Tiu translokigo certigas longdaŭran konservadon de niaj arkivoj, ilian instituciigon, kaj malfermas eblecojn por esplorado de studentoj.

Tiu ĉi decido estis farita kun la membraro. Mi pensas ke estas la bona decido tiutempe. Tamen, laŭ mia opinio, tiu translokigo konstatigas, ke nia asocio ne povis mem valorigi kaj protekti ĉi tiun heredaĵon. Kvankam tiu decido estas bela kaj valora oportuno, nia asocio ne plu povas zorgi pri tiuj arkivoj. Neniu en nia asocio legis tiujn trezorojn...

Tamen, tiu ĉi projekto por instituciigo de la esperantaj arkivoj estas bonega ŝanco por publika malfermo! Francaj institucioj estas tre stabilaj, kio estas garantio de daŭripovo. Studentoj havos la eblon sin enprofundigi en intereseajn studojn. Krome, ni povos malpezigi niajn nunajn oficejojn, kiuj ne estas alireblaj por personoj, kiuj malfacile moviĝas, kaj eble konsideri ŝanĝi oficejojn estontece. Tio ankaŭ ebligas nin proponi pli modernan biblioteko-servon kaj allogi pli vastan publikon.

Ni ankaŭ aĉetis skanilon por disvastigi kelkajn trezorojn tra la interreto. Ni ne povas scii nuntempe ĉu la daŭripovo de datumoj estas valora, sed estas oportuno ke ni estigas nun kaj ĉi-tie.

Kore,
Marc-Olivier GRAZIANI

* ENS (École Normale Supérieure) estas prestiĝa altlernejo en Francio, kiu trejnas profesorojn kaj esploristojn. CNRS (Centre National de la Recherche Scientifique) estas la plej granda esplorinstituto en Francio, subtenanta diversajn sciencajn projektojn. Ili ambaŭ estas konataj pro siaj akademias kaj sciencaj ekscelencoj.

☛ **Retejo kaj sociaj retejoj:** Nia retejo ĵus travivis etajn ŝanĝojn. La ĉefa novigo estas la aldono de paĝo dediĉita al niaj novaj retaj kursoj, kiuj komenciĝos fine de septembro. Tiuj kursoj estos disponeblaj por ĉiuj, kiuj volas lerni nian lingvon. Ni ofertas diversnivelaĵojn kursojn, tiel ke ĉiu trovos ion taŭgan laŭ sia nivelo.

Krom la reteja evoluo, ni ankaŭ fortigis nian ĉeeston en sociaj retoj. Ni nun aktivigas kaj sur Facebook kaj sur Instagram, kie ni regule aŝiŝas enhavon pri Esperanto, nia klubo, kaj la venontaj eventoj. Tio estas grava paŝo por konektiĝi kun pli vasta publiko kaj plivastigi nian komunumon.

Ni kuraĝigas ĉiujn membrojn subteni nian klubon per sekvaĵo de niaj paĝoj sur Facebook kaj Instagram. Via subteno estas gravega por ni! Ne forgesu doni al ni vian "like" (levita dikfingro) kaj disvastigi la mesaĝon al viaj amikoj kaj familio.

Via engaĝiĝo helpas kreskigi nian komunumon kaj fari Esperanton pli videbla kaj alirebla por ĉiuj!

☛ **Nova Skana Aparato por Nia Asocio:**

Konservado de Nia Heredaĵo: Ni ĝojas anonci, ke nia asocio ĵus investis en nova skana aparato, kiu ebligas al ni rapide skani librojn kaj dokumentojn. Ĉi tiu moderna aparato ebligas nin efike bitigi valorajn materialojn, kiuj fariĝos alireblaj por pli vasta publiko, precipe en retejoj kiel Wikisource, kie oni povas konservi kaj disvastigi kulturen heredaĵon.

Kvankam la aparato estas facile uzebla, la procezo de skanado tamen postulas multajn tempon kaj atenton por certigi, ke ĉio estas skanita kun alta kvalito. Mi laboras kutime dum la vespero por tiu tasko.

Ni kredas, ke tiu laboro estas precipa por konservi kaj valorigi nian lokan heredaĵon, por ke ĝi estu disponebla al estontaj generacioj. Ni estas tre entuziasmaj pri tiu projekto kaj antaŭĝojas vidi la rezultojn de niaj klopodoj. Baldaŭ ni revenos kun belaj dokumentoj, kiuj estos rapide disponeblaj sur nia retejo. Via subteno kaj pacienco dum ni laboras pri tiu grava tasko estas tre aprezataj.



☛ **Lerni Esperanton per vortaj ludoj - Neil**

ROBERTS : Ĉu vi konas Wordle? En 2021 aperis tiu furora retpaĝo kiu ĉiutage havas novan ludon por diveni vorton. Ĝi rapide fariĝis tiel populara ke fine aĉetis ĝin The New York Times kontraŭ 7-cifera sumo da dolaroj. La sekreto de ĝia sukceso estas triflanka: unue, ĝi estas tre simpla. Kutime oni povas solvi ĝin ene de kelkaj minutoj dum oni atendas buson aŭ dum alia senutila tempo de la ĉiutaga vivo. Due, ĝi instigas onin kunhavigi sian sukceson per eta mesaĝo en la sociaj retoj konsistanta el koloraj kvadratoj. Tio vekas la scivolemon de oniaj interretaj amikoj kaj kreas virusan disvastiĝon. Trie, se oni sukcesas ludi ĝin ĉiutage la retpaĝo nombras la tagojn de senrompa ludado tiel ke oni ne volas maltrafi tagon kaj perdi sian ĝisnunan «gajnicon». Tiun dependigan sistemon esperantistoj jam bone konas pro Duolingo.

Kompreneble aperis ankaŭ tradukoj de la ludo. Ekzemple estas tre populara franclingva versio kiu nomiĝas SUTOM. Tamen plej interese por ni estas ke aperis ne nur unu sed du esperantaj versioj! Ili nomiĝas Vortjo kaj Wordleo. Ambaŭ daŭre restas popularaj. Ludi per nendenaska lingvo aldonas apartan intereson al la ludo ĉar oni povas ekzerci sin pri sia vortscio kaj lerni novajn vortojn. La ludo ne plu estas nur bagatela distraĵo sed vere utila ilo!

La adaptiĝoj ne temas nur pri tradukoj sed fakte lanĉiĝis tute nova ĝenro de similaj ludoj. Unu populara ludo estas Waffle en kiu oni havas literojn en formo de vaflo kaj oni devas reordigi ilin ĝis ĉiu linio kaj kolono iĝas vorto. Mi mem kreis esperantan version de tiu ludo ĉe vaflo.net. Antaŭ nelonge ĝi festis sian datrevenon de jaro de puzloj. Tufreŝe aperis ankaŭ esperantigo de alia ludo kiu nomiĝas Intervorto. Oni devas diveni vorton kaj la komputilo informas onin ĉu la serĉata vorto aperas antaŭ aŭ post la provita vorto laŭ la ordo de la vortaro. Oni rajtas plurajn provojn tiel ke oni pli kaj pli limigas la gamon de eblaj vortoj ĝis oni trovas la ĝustan.

Kion vi pensas? Ĉu tiaj ludoj povas helpi pri lernado kaj disvastigado de Esperanto?

☛ **Disvastigo** : Andréa Bertrand montris grandan sindediĉon ĉi-somere por disvastigi nian lingvon. Ŝi havis ok lernantojn, el kiuj nur kvin partoprenis la tutan semajnon. Ni kore dankas ŝin pro ŝia valora laboro kaj entuziasmo!



☛ **Kongreso en Afriko - Joseph CATIL** : La 109-a Universala kongreso okazis en Aruŝo (Tanzanio) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024 por la unua fojo en la afrika kontinento. Ĝi arigis 854 homojn el 66 landoj el kiuj estis 50 Francoj.

Esperanto disvastiĝis de longe tie kun la helpo-subteno de S-ro Hans Bakker el Germanio.


Inter la diversaj prelegoj, kelkaj homoj povis malkovri la La svahila-lingvon aŭ Kiswahili.

Foje en la kutimaj kongresoj, ni povis vidi afrikanojn el diversaj landoj.

Je la fino de la kongreso, la estraro de UEA elektis por 2025 la kongresurbon BRNO 13-a ĝis 26-a julio en Ĉekio.

☛ **Geologiaj kuriozaĵoj en Bulgario** ! Anita Bastrenta

1. Belogradĉik-rokoj kaj fortikaĵo: En la nordokcidento de Bulgario staras impona geologia loko kaj unu el la plej belaj naturaj pejzaĝoj, kiujn oni povas vidi en tiu lando, kiel rezulto de rara kaj escepta geologia fenomeno: la Belogradĉik-rokoj.



Tiuj rokformacioj de grejso, kalkŝtono kaj sabla konglomerato povas atingi alton de 200 m, okupante tre grandan areon (ĉirkaŭ 30 km en longo kaj 3 ĝis 5 km en larĝo). Formitaj per vento, pluvo kaj temperaturvarioj, iliaj strangaj aspektoj kaŭzis multajn legendojn en la bulgara folkloro. Efektive, mitaj estaĵoj, homaj figuroj, bestoj kaj birdoj proponas sin al la imago de vizitantoj.

2. La Belogradĉik-fortikaĵo: Ĝi situas sur la loko de la Rokoj.

Ĝi okupas altan parton de la tero, je 610 metroj super la marnivelo, certigante imponan vidon. Ĝi etendiĝas sur entute 10.200 m², utiligante la grandajn rokojn por subteni kaj integri sian strukturon, formitan de tri sinsekvaj elementoj, ĉiu kun sia defenda pordo.

Antaŭe romia fortikaĵo, poste otomana, ĝi funkciis ĝis la komenco de la 20-a jarcento. Ĝia lasta rekonstruo datiĝas de la komenco de la 19-a jarcento kaj estis farita de francaj inĝenieroj.

Eĉ hodiaŭ strangaj observantoj gardas!



3. Pobiti Kamani: la ŝtonigita arbaro:

Pobiti Kamani situas 18 kilometrojn okcidente de Varno. La loko estas malofta natura fenomeno, unika en Eŭropo kaj aĝa 50 milionojn da jaroj. Sur areo de 253 hektaroj staras nekutimaj rokoj, naturaj kolonoj parte plenigitaj de sablo, kiuj povas atingi alton de 6 metroj.

La origino de Pobiti Kamani restas necerta. Ĉu tiuj koralaj rifoj estis postlasitaj post kiam la maro retiriĝis? Ĉu ŝtonaj kolonoj formiĝis ĉirkaŭ gigantaj algoj? Pluraj hipotezoj konkuras. Elfosadoj en la loko rivelis la ĉeeston de paleolitikaj loĝejoj kaj sugestas ke la ŝtonoj ludis sanktan rolon.

La mita kaj mistera aspekto de la "arbaro" transformis Pobiti Kamani, dum multaj okazoj, en filman scenon, precipe por la filmo Vercingétorix kun Christophe Lambert.

Oktobro 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis

Reprise des cours en ligne pour débutants le 23/09 à 18h30.

Kulturaj Renkontiĝoj : retour le 10 et 17 octobre 2024 suite au succès du mois de juin !

Stages linguistiques : 16 novembre et 30 novembre 2024 !

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Marilou COCHARD,
Joseph CATIL, Anita BASTRENTA, Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Mi tre ŝatas la monaton septembran. Kvankam ĝi ne estas printempa, ĝi estas periodo de renovigo. Ni faras multajn belajn renkontojn dum tiu periodo.


Unue, ni renkontis Sinjorinon GIORDANENGO, kiu prizorgos niajn dokumentojn. Ŝi estas tre sindediĉa persono! Ŝi venis al la sidejo de nia asocio kaj ni havis varmajn kaj tre instruajn interparolojn.

Ankaŭ persono venis al la sidejo por membriĝi en nia asocio. Li estis formita de iu Sinjoro MAILLOT en la 1980-aj jaroj en nia asocio!

Ni ankaŭ renkontis niajn novajn membrojn, kiuj partoprenas en la kursoj por komencantoj! Ili estas ĉiuj eksterordinaraj homoj! Estas Swanilda, Catherine, Agostino (15-jara) kaj Paolo lia patro, Yann, Alain, Benjamin, Claire kaj Mikael!

Niaj sindonaj membroj Andréa, Anita, Neil, Nadia, Thierry R., kaj Yann ankaŭ partoprenis en asociaj forumoj kaj interparolis kun pli ol 30 interesitaj homoj. Fakte, eĉ la urbestro de Lyon, Sinjoro Gregory DOUCET, venis por interparoli pri nia lingvo!

La energio de renovigo, kiun alportas ĉi tiu monato, estas videbla en la engaĝiĝo de niaj novaj membroj kaj la subteno de niaj sindonaj volontuloj. Ni estas sur bona vojo por plue disvastigi Esperanton! Mi antaŭĝojas pri la venontaj projektoj kaj eventoj, kiuj plifortigos nian komunumon kaj celon!



Kore,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ **Asociaj forumoj:** Ni volas esprimi niajn sincerajn dankojn al niaj sindonemaj volontuloj Andréa, Neil, Nadia, Anita, Yann, kaj Thierry, kiuj dediĉis sian tempon al nia asocio. Ilia bonkoreco estas vera trezoro por ni kaj donas al nia asocio belegan videblecon!



☛ **Baba Vanga: mondfama bulgara virino** - Anita BASTRENTA : Ĉu vi iam aŭdis pri Vangeliya Pandeva Gushterova, pli konata kiel Baba Vanga? Ŝi estas la plej fama bulgara klarvidanto en Balkano kaj pretere.

Naskita en 1911, ŝi perdis sian vidon en la aĝo de 12 kiam ŝi estis forblovita de tornado. Ŝi estis trovita post pluraj horoj kun la okuloj plenaj de sablo. De tiu momento, ŝi kreskigis povojn de prognozo.

Baba Vanga fariĝis "ikono" en la landoj de la malnova komunista bloko; kelkaj el ŝiaj antaŭdiroj laŭdire realiĝis je 85%. Efektive, la klarvidanto antaŭdiris, interalie, la sinkon de la rusa submarŝipo Kursk, la elekton de afro-amerikana prezidanto en nedeterminita estonteco, la morton de Princino Diana, la atakojn de la 11-a de septembro kaj eĉ la daton de sia propra morto!

Baba Vanga loĝis en modesta domo en Rupite (Petrich) en la sudokcidento de Bulgario, kie ŝi ricevis siajn "klientojn". Ŝi mortis la 11-an de aŭgusto 1996, en la aĝo de 85. Ŝia entombigo altiris grandajn homamasojn, inkluzive multajn eminentulojn.

Ne ĉia klarvido estas bona por malkaŝi; Baba Vanga pasigis 6 monatojn en malliberejo pro antaŭdiro de la morto de Staline!

Kion ŝi antaŭdiris por Esperanto? Estas al vi ekscii! Avertu: ŝiaj antaŭdiroj iras ĝis la jaro... 5079!



☛ **Rakonto pri naturo** - Joseph CATIL : Eŭrazia upupo (Huppe fasciée, Upupa epops) vivas plej ofte en herbejoj kaj kultivataj zonoj, eĉ en vitejoj. Ĝi restadas de aprilo ĝis septembro en niaj regionoj kaj vintras en Afriko. Ĝi ŝatas herbejojn kaj ŝtonajn grundojn por trovi insektojn kaj vermojn. Ĝi ne estas kaŝema sed gardas distancon el la observanto. Ni povas observi sian neston en arbtruoj, murtruoj, en malnovaj konstruaĵoj. Ĝi havas oranĝbrunan plumaron kaj larĝajn rondformajn flugilojn nigreblanke striatajn. Ĝia kapa plumtufo spontane erktiĝas, kiam ĝi alteriĝas post neregula flugado, kaj tiam ni povas rimarki ĝian longan mallarĝan bekon. Ĝia alarmkrio estas grinca « ĉeer » ĝia kantado, al kiu ĝi ŝuldas sian nomon, estas "up-up-up" plurfoje ripetata, obtuza en proksimeco sed bone aŭdebla de malproksimo.



☛ **Vassieux en Vercors** - Marilou COCHARD : Tiun someron, mi iris sur la tablomonton Vercors.



Por supreniri tiun monton estas tri ĉefaj vojoj, de Grenoble de Die kaj de Saint-Jean-de-Royans kaj kelkaj malpli precipaj. Unu el ili trapasis per tiu pejzaĝo.



Vojo al la tablomonto

Pluraj vilaĝoj troviĝas sur la tablomonto inter la kampoj, la arbaroj kaj la brutaroj. Mi parolos pri Vassieux.

En Vassieux, estas la Muzeo de la Rezistado, kaj Memorigaĵo kiuj memorigas al ni la agadon de la homoj kiuj kontraŭstaris la germanojn dum la milito de 1939-1945. La muzeo estis kreita en 1973.

Por agi kontraŭ la Germanoj kaj la registemo de Vichy, la franca rezistado komencis ekde 1940 per diversaj agadoj :

- Agi kontraŭ la okupaciantoj per sabotoj kaj kaŝitaj agadoj.
- Militi kaj propagandi eksterlande.

Kelkaj famaj rezistantoj estis Jean MOULIN, Henri FRENAY kaj Berthie ALBRECHT.

Henri Frenay kaj Berthie Albrecht :



Sed la Germanoj invadis la sudan parton de Francio, kaj organizis en 1943, devigan laborservon (STO) kiu sendis 700 000 francojn en Germanion. Tiam multaj junaj homoj volis eskapi tiu servon (300 homoj iris sur la tablomonton Vercors). Tiel naskiĝis makiso en pluraj regionoj. La ĉefa makiso estas tiu de Vercors. Post la normandia elŝipiĝo en junio 1944, dum kelkaj tagoj, 4000 homoj alvenis sur la tablomonton.


La vivo organiziĝis :

- Por ricevi la pakaĵojn senditajn per paraŝutoj de la usonaj aviadiloj.
- Por zorgi la radiajn instalaĵojn kiuj ebligis komuniki kun la eksterlanda franca armeo.
- Por gardi la vojojn kiuj kondukis al la tablomonto..
- Por sin ekzerci al uzado de armiloj.

Male al la aliaj makizoj kiel tiu de Glières en Savojo, en Vercors estis civilaj popoloj kiuj subtenis la makizanojn. Ili pagis la prezon de tiu subteno.

La 21an de julio 1944, 10 000 germanaj kaj aŭstriaĵ soldatoj invadis la tablomonton. La makizanoj dispeliĝis kaj la germanoj rastis la monton kaj la kamparon mortigante multajn homojn (viroj, virinoj, infanoj kaj beboj). La bilanco estis peza : 840 homoj mortis inter ili 201 civiluloj, 573 domoj estis detruitaj, la revoltoj estis brulitaj kaj la brutaroj mortigitaj.

La muzeo prezentas tiun historion sur proksimume 50 tabuloj. Multaj el ili montras la fotojn de mortintaj loĝantoj kaj de kuraĝulojn kiuj rezistis kontraŭ la okupaciantoj kaj ankaŭ la rakontojn faritajn de la loĝantoj pri la eventoj. Ĉio estas kortuŝa.



Novembro 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolion.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis

Nouveaux cours en ligne A2 - B1 à partir du 07/11.

Cours en ligne pour débutants le 23/09 à 18h30 - COMPLET

Stages linguistiques : 16 novembre et 30 novembre 2024 !

KoToPo : "Kiel Vi" tous les derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Anita BASTRENTA,
Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj membroj,

Ni invitas vin aliĝi al nia asocio por la jaro 2024-2025 kaj daŭrigi nian komunan vojaĝon por disvolvi kaj subteni la lingvon Esperanto. Ni intensigas niajn klopodojn kaj proponas diversajn manierojn por partopreni kaj subteni la movadon.

Nia asocio fieras pri siaj arkivoj, kiujn ni aktivas konservi kaj valorigi kiel ateston pri nia longa historio. Krome, ni senĉese celas novigi kaj disvastigi Esperanton per diversaj rimedoj: lingvaj trejnadaj, virtualaj kursoj, kulturaj eventoj kaj renkontiĝoj.

Via aliĝo gravas por ke ni povu daŭre vastigi la atingon de Esperanto kaj inspiri novajn generaciojn. Kun via subteno, ni plu fortigos nian agadon kaj atingos niajn celojn.


Ni antaŭĝojas vidi vin ĉiujn baldaŭ!

Kore,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ **Lingvaj Staĝoj:** Kiel parto de niaj klopodoj por disvastigi nian lingvon, ni malfermis intensan staĝon por komencantoj ĉi-jare, kaj ni ĝojas anonci, ke jam 7 personoj aliĝis! La unua staĝo okazos la 16-an de novembro por komencantoj, kaj la dua, la 30-an de novembro, por progresantoj, ĉe la Maison Berty Albrecht en Villeurbanne.

Nia instruista teamo estos aparte pliriĉigita ĉi-jare, ĉar Michel DECHY afable akceptis veni al Liono por gvidi la unuan staĝon! Kun lia vasta sperto pri instruado, inkluzive en lernejoj, li kontribuos per sia ludema kaj dinamika aliro, kiu fariĝis lia specialaĵo. Li laboros flanke de Andréa BERTRAND, kiu estas bone konata pro sia dediĉo al Esperanto-instruado en Francio.

Ni feliĉas vidi tiun entuziasmon ĉe la novaj lernantoj kaj dankas vin ĉiujn pro via konstanta subteno, kiu permesas al nia asocio atingi pli kaj pli da homoj per Esperanto.



Nivelo A2 > B1 : Novaj Kursoj de Andréa, Ankaŭ Rete!

Ni ĝojas informi vin, ke Andréa proponas novajn kursojn por progresantoj de nivelo A2 al B1, komenciĝontaj la 7-an de novembro. Ĉi tiuj kursoj okazos rete je la 18h30 ĝis la 19h45, kio ebligas al ĉiuj partopreni.

Ĉi tiuj lecionoj estas proponitaj por tiuj, kiuj jam posedas la bazojn de Esperanto kaj volas plibonigi siajn kapablojn por atingi pli altan lingvonivelon.

Ne hezitu kontakti nin por pliaj informoj. Ni antaŭĝojas vidi vin en ĉi tiuj novaj lecionoj!

☛ **Inaŭguro de la retejo pri la vojaĝo de Lucien Péraire (1928-1932)**

Espéranto-France organizas en Parizo la inaŭguron de retejo dediĉita al la arkivoj de la mirinda vojaĝo de Lucien Péraire, kiu bicikle travojaĝis de Eŭropo ĝis Orienta Azio inter 1928 kaj 1932. Lia vojaĝo komencis en Liono! La evento okazos lundon, la 4-an de novembro 2024, ĉe la EHESS (54 boulevard Raspail, Parizo), de 17h ĝis 20h30.


Ni invitas vin jam viziti la novan retejon ĉe <https://peraire.huma-num.fr/>, kie vi povas esplori ĉi tiun nekutiman heredaĵon. Tiu ciferecigita arkivo dokumentas la staton de la mondo en la 1930-aj jaroj tra la rigardo de juna esperantisto kaj inkluzivas fotojn, mapojn, kaj multajn aliajn historiajn materialojn.

La rakonto de Lucien Péraire estas konservita en tri versioj (stenografio, franca kaj esperanta), akompanata de fotoj, poŝtkartoj, geografiaj mapoj, teksaĵoj, korespondaĵoj kaj broŝuroj, kiuj dokumentas lian eksterordinaran vojaĝon – unu el la lastaj eblaj – dum tempo kiam la leviĝo de totalismaj reĝimoj, kiuj fine kondukos al la Dua Mondmilito, preskaŭ fermos la mondon. Ĉi tiu valora heredaĵo, enhavanta ankaŭ fragilajn karbopaperajn kopiojn kun malaperanta blua inko, estas nun savita danke al ciferecigo kaj disponebla al la publiko pro la laboro de la teamo de la Centro Alexandre Koyré. La projekto estis subtenata de la DIM Matériaux anciens et patrimoniaux (MAP) kaj Patrimoines matériels - innovation, expérimentation et résilience (PAMIR).

La arkivo de Péraire, nun alirebla al ĉiuj, proponas riĉan priskribon de la mondo kaj de la ĉiutaga vivo de ordinara homoj ĉirkaŭ 1930, de Eŭropo ĝis Fora Oriento, tra la kompara rigardo de juna amatora antropologo.



La vasta subtera tunela reto de la Rufa Krucio, konata kiel "Fiŝoskeleto," konsistas el 1,4 kilometroj da galerioj, 480 metroj da tuneloj, 34 koridoroj, kaj 16 ŝaktoj. Malgraŭ unuaj mencioj en la arkivoj en 1651, estis nur en 1959 kaj poste en 1961, post pluraj strataj enfaloj, ke la galerioj estis vere esploritaj kaj plifortigitaj.



Dum tiuj esploroj oni malkovris ceramikajn fragmentojn, antikvajn metalobjektojn, kaj restaĵojn de bronza laŭrokrono kovrita per orfolio. En 2013, arkeologoj analizis latinajn grafitiojn trovitajn sur la muroj kaj uzis karbon-14-datiĝon por lignofragmentoj en la pistuoj de la galerioj: la tuta strukturo datiĝas el la antikva periodo (inter la 4-a jarcento antaŭ J.K. kaj la komenco de la 1-a jarcento post J.K.).



La funkcio de tiuj galerioj restas mistero. Ili neniam estis uzitaj. Iuj opinias, ke temas pri malnova ŝtonminejo el la romia epoko, kiu eble utilis por konstrui la konstruaĵojn de Lugdunum, la antikva urbo de Liono. Aliaj sugestas, ke ĝi povus esti uzita kiel monprovizo, ĉar Liono estis unu el la plej grandaj imperiaj monfarejoj en la romia Okcidento. Alia hipotezo proponas, ke ĝi povus esti deponejo de la Templanoj, kiam la Rufa Kruco apartenis al la sinjoro de Miribel kaj granda majstro de la Templana Ordono, Guillaume de Beaujeu. Tamen, neniuj formala pruvo ankoraŭ confirmis tiujn teoriojn.

la tre kompleksan aersistemon. Aŭ eble metalojn por la monfarejo de Liono, kiu havis relative mallongan vivdaŭron kiel la Fiŝoskeleto mem."

Restas aliaj nesolvitaj misteroj: kiel la metiistoj sukcesis elfosi kaj pavimi en tia rekta linio sen modernaj mezuriloj kaj precipe en mallumo? Kien malaperis la elfositaj ruboj?


La reto estas regule vizitata de katakombomaniuloj, kiuj bedaŭrinde markas la murojn kaj damaĝas tiun heredaĵon.

Hodiaŭ, aliro al tiuj galerioj estas malpermesita kaj fermita pro la komplekseco de la ejoj kaj la risiko de falo. Ne ekzistas organizita vizitcirkvito por la ĝenerala publiko. Tial la liona urbodomo proponas virtualan viziton en sia retejo: <https://aretesdaepoisson.lyon.fr/>, aŭ gvidatan (por tiuj el ni malpli lertaj pri komputiloj), aŭ libere. (Se via retumilo defaŭlte, alkalku "Alirebleco").



Vi malkovros la galeriojn, poste la du antenojn kaj la ĉambrojn, kiuj troviĝas ĉefe sur la altebenaĵo de la Rufa Kruco, kaj du vidpunktojn: unu montrante la nunan konstruaĵaron, kaj alian montrante antikvan vidon kun la amfiteatro. Vi ankaŭ malkovros la diversajn hipotezojn kaj ĝisdatigojn laŭ la progreso de la esploroj.

Estas certe: la subtera reto Fiŝoskeleto konsistigas gravan parton de la heredaĵo de Liono, kiu meritas esti respektata kaj protektata.



Decembro 2024

Ĝis Cent

Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00
Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com
Sites Internet : <https://esperantolyon.org> www.esperanto-france.org



KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV
les mercredis

Nouveaux cours en ligne A2 -
B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants
le lundi soir à 18h30 -
COMPLET

Fête de l'Espéranto la 8a de
decembro

KoToPo : "Kiel Vi" tous les
derniers mardis du mois

UAICL : "Babilrondo" chaque
lundi soir

KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de
Thierry TAILHADES
<https://tjerielliono.blogspot.com/>

Aŭtoroj: Anita BASTRENTA,
Marc-Olivier GRAZIANI

ANTAŬPAROLO

Karaj membroj,

La monato finiĝis en etoso de diligenteco kaj lernemo! Ni ĝojas informi vin, ke niaj membroj havis la privilegion partopreni lingvajn staĝojn, al kiuj eĉ vojaĝis partoprenantoj el malproksimaj lokoj kiel Draguignan kaj Valence. Grandan dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu sukceso!

Ni havis la honoron ricevi Michel DECHY en Lyon, kie li instruis dum la staĝo por komencantoj. Lia ĉeesto estis vera inspiro!

Specialan gratulon ni volas sendi al Andréa BERTRAND, kiu iniciatis la ideon proponi tiajn staĝojn por vivigi nian asocion. Via engaĝiĝo, Andréa, donas al ni ĉiuj novan energion – bonege farite!

Fine, ankaŭ la retaj kursoj progresas kun du niveloj disponeblaj. Paŝon post paŝo, nia asocio plifortiĝas kaj nia komunumo kreskas. Ĉiu kontribuas laŭ sia maniero al tiu bela movo. Ni daŭrigu tiel!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

☛ **Lingvaj Staĝoj:** La foto de niaj studentoj vekis demandon de Andréa: "Ĉu la submetita tasko estis malfacila?" La koncentriĝo kaj seriozeco sur la vizaĝoj de la partoprenantoj povas ja sugesti tion! Tamen, eble temas nur pri la ĝojo plonĝi en lernadon de nia bela lingvo. Kaj vi, kion vi pensas? 😊



☛ **La Premio Nobel de Paco 2024: Leciono pri Memoro kaj Engaĝiĝo** - La Premio Nobel pri Paco ĉi-jare estis aljuĝita al la japana organizaĵo Nihon Hidankyo, kiu reprezentas la postvivantojn de la atomaj bombadoj en Hiroŝimo kaj Nagasaki, konatajn kiel "hibakusha". Ekde ĝia kreado en 1956, Nihon Hidankyo batalas por la forigo de nukleaj armiloj, uzante la potencon de personaj atestoj por vidigi la detruan efikon de tiuj armiloj.

La norvega Nobel-komitato emfazis la gravecon de ilia agado, deklarante ke "ili montris per siaj rakontoj ke nukleaj armiloj neniam plu devas esti uzataj." Ĉi tiu premio memorigas nin pri la neceso protekti la memoron de pasintaj katastrofoj por eviti ilian ripetigon.

En la nuntempa mondo, kie internaciaj rilatoj pliakriĝas, la mesaĝo de la hibakusha sonas pli forte ol iam ajn. Ilia engaĝiĝo instigas nin al pli forta konscio pri la danĝero de nukleaj armiloj kaj al kunlaboro por paca mondo.



☛ **Vivu la memoro! La festo de Esperanto en Liono proksimiĝas!**



Dimanĉe, la 8an de decembro, de la 10h30 ĝis la 17h, ni invitas vin al la Maison des Solidarités en la 3a arondismento de Liono por celebri la memoron – la ĉeftemon de ĉi-jara festo de Esperanto.

Ĉu vi scivolas pri la arkivoj de nia asocio en Liono? Ĉu vi ŝatus partopreni en ludoj kaj atelieroj por plifortigi viajn memorajn kapablojn? Ĉio ĉi kaj multe pli atendas vin dum ĉi tiu unika tago dediĉita al memoro kaj transdono.

La kulminon de la tago formos la kreado de nia tempokapsulo, kiu estos malfermita post... 137 jaroj! Ne maltrafu ĉi tiun okazon enskribi vian mesaĝon en la historion.

Kunigu vin al ni por ĉi tiu memorinda evento plena de agadoj, kunmanĝoj kaj kunularo. Bonvenon al ĉiuj – ni antaŭĝojas renkonti vin!

Programo kaj detaloj disponeblas en nia retejo. Ne forgesu alporti pladon por kundividi!



La Sankta Bruno-preĝejo apud la Kartuzianoj: unu el la plej belaj ekzemploj de baroko en Liono!

- Anita BASTRENTA



En 1584, du kartuzianaj monaĥoj de Grenoblo petis Reĝo Henriko la 3-a, kiu vizitis Lionon, permeson por fondi sian monaĥejon. Li konsentis kaj donis al ĝi la nomon "Monaĥejo de la Lilio Sankta

Spirito." Pro tio, la simbolo de la reĝa lilio estas ofte vidata en la preĝejo Sankta Bruno, la sola restaĵo de tiu monaĥejo.

La konstruado de la preĝejo komenciĝis en 1590 kaj finiĝis en 1872 post multaj historiaj eventoj.

- **1590–1690:** Laŭ la planoj de arkitekto Magnan, estis konstruitaj la bazoj, la muroj ĝis la altaj fenestroj, la kanonikarejo, kaj la sakristio.
- **1736–1750:** Arkitektoj Delamonce kaj Soufflot donis al la preĝejo ĝian nunan aspekton.
- **1871–1872:** Arkitekto Sainte-Marie Perrin kompletigis la konstruaĵon.

La preĝejo havas unikan dezajnon: la korusejo estas preskaŭ tiel longa kiel la navo. La transepto apenaŭ elstaras en la navo. Rimarkinda detalo estas la malgranda okangula kupolo kun 8 ovalaj fenestroj, desegnita de Delamonce en 1736.

La baldakeno en la preĝejo, farita de la italo Servandoni en 1738, imponas per sia aŭdaco kaj beleco. Kvankam ĝi ŝajnas esti farita el marmoro kaj ŝtono, nur la kolonoj estas marmoraj. La ornamoj estas el orumita ligno kaj stukitaj drapiraĵoj, faritaj el linaĵo trempita en gipso. Supre estas nuba ĉielo kun anĝeloj, faritaj el stukita kartono.

La preĝejo estis restaŭrita dum pli ol 20 jaroj. La restaŭrado de la stukitaj drapiraĵoj estis la plej malfacila laboro, ĉar ĝi ne havis antaŭajn ekzemplojn.

La Sankta Bruno-preĝejo, renovigita juvelo de la baroka arto, estas malfermita de lundo ĝis sabato, inter la 15-a kaj la 17-a horo (fermita dimanĉe kaj dum festotagoj). La vizitoj estas eblaj danke al volontuloj de

la asocio "Sankta Bruno, Splendo de la Baroko" (<https://baroque-stbruno.org>).



Adreso: Preĝejo Sankta Bruno, 56 rue Pierre Dupont, Lyon 1-a.

Buslinioj: 2, 45, C13, C18, haltejo "Clos Jouve."

Napola kripo

De la 5-a de decembro 2024 ĝis la 5-a de januaro 2025, la preĝejo gastigos tradician napolan kripon kun pli ol 110 manfaritaj figuroj, fidelaj al modeloj el la 18-a jarcento. La kripo, instalita sur 15 m², prezentas tri scenojn laŭ la tradicio de napolaj kripoj. Ĉiujare aldoniĝas novaj figuroj, de simplaj homoj ĝis eminentuloj en luksaj vestoj.



Horoj de vizito:

- De la 5-a ĝis la 8-a de decembro 2024 kaj de la 13-a de decembro ĝis la 5-a de januaro 2025: de lundo ĝis sabato, inter la 15-a kaj 17:30 horo.
- Fermite de la 9-a ĝis la 12-a de decembro 2024 kaj la 1-a de januaro 2025.